# Ĝis Cent

*Siège : 7, rue Major-Martin 69001 Lyon - Sur RDV mercredi de 17h30 à 20h00*
*Contacts : +33 (0)7 69 29 82 97 – esperantoliono@gmail.com*
*Sites Internet : https://esperantolyon.org www.esperanto-france.org*




## KALENDARO

Siège et Bibliothèque : sur RDV les mercredis.

Cours en ligne niveau A2 - B1 le jeudi soir ! Nouvelle formule.

Cours en ligne pour débutants le lundi soir à 18h30

***

KoToPo : “Kiel Vi” tous les derniers mardis du mois

UAICL : “Babilrondo” chaque lundi soir

## KOLOFONO

Provlegita kaj korektita de Thierry TAILHADES https://tjerielliono.blogspot.com/

Aŭtoroj: Marc-Olivier GRAZIANI -

## ANTAŬPAROLO

**Feliĉan novjaron!**

La jaro 2026 devas esti la jaro de kolektiva inteligenteco por nia asocio. En nia epoko de aŭtomateco, en kiu eĉ la parolo estas imitata de robotoj, kaj en kiu eĉ milito povas fariĝi aŭtomata, nia loka asocio devas esti loko kie ni lernas, dividas pace ideojn, legas, kaj skribas.

Nia epoko emas aŭtomatigi ĉion, kaj tiel normigi la mondon. Robotoj riskas malriĉigi la diversecon. Kun la evoluo de lingvaj modeloj bazitaj sur artefarita intelekto, ni scias, ke ili influas niajn pensmanierojn kaj povas uniformigi niajn mensojn.

Ni devas fari el Esperanto ilon por rehomigi mondon kiu difektiĝas.

Parolu Esperanton! Lernu pli! Ludu! Dividu viajn konojn! Legu! Ĝuu la veran vivon per homaj agadoj.

Amike,
Marc-Olivier GRAZIANI

ESPERANTO LYON

☛ **La Hôtel-Dieu tra la jarcentoj: kultura tago de AFCE Liono -** Andréa BERTRAND

Ĉiujare la liona grupo AFCE (association française des cheminots espérantistes) okazigas tuttagan kulturan renkontiĝon, tial vendredon matene la 14an de novembro deko da homoj troviĝis en ĉambro de la fervojista domego, apud la stacidomo Perrache, por aŭskulti Daniel Lordier prelegi pri la historio de la hospitalo Hôtel Dieu ekde ĝia kreado en 1177 ĝis 2010 ĝia definitiva fermo. Daniel laboris tie kiel studento kaj kuracisto kaj li ankaŭ priparolis la evoluadon de la kuracado rakontante multajn anekdotojn.



La organizantoj ĉiam atentas pri la kosto por ke la kultura tago estu alirebla por plej multaj homoj kiel eble. Ĉi-jare ĝi kostis al ĉiu partoprenanto €29 por la tago, inkluzive manĝojn.

Post la tagmanĝo en la restoracio CAS I Lyon, la grupo iris al 1 Place de l'Hôpital, Lyon 2, antaŭ la enirejo de la Hôtel-Dieu. Gvidata rondiro organizita de la turisma oficejo de Lyon ebligs al ni malkovri ĉi tiun historian monumenton, kiu lasis sian spuron sur generacioj de lionanoj.

Ekde la komenco de la 12-a jarcento, hospico ekzistis ĉe la fino de la ponto Rodano (Ponto Guillotière). François Rabelais praktikis medicinon tie en 1532. Sinsekvaj pligrandigoj de la konstruaĵo kulminis per konstruado fare de Soufflot de longa, 375-metra fasado ĉe la dekstra bordo de Rodano. Ni promenis tra kvin internaj kortoj konektitaj per la kovritaj pasejoj de la klostroj. Ni ne povis viziti la Apotekon de la Muzeo de Hospicoj, kiu estas translokigita al Rockefeller-Hospitalo en Liono. Aliro al la Granda Kupolo, detruita de incendio en 1944 kaj rekonstruita laŭ la originala plano, hodiaŭ dependas de la komerca ekspluatado de la konstruaĵo.



Hodiaŭ, ĉi tiu restaŭrita historia monumento estas dediĉita al komerca kaj turisma libertempo, enkorpigante la Cité Gastronomique (Gastronomia Urbo) kaj la kvin-stelan « Grand Hotel » .



☛ **Lumfesto en Liono -** Andréa BERTRAND

Ekde mia infanaĝo, la 8an de decembro mi preskaŭ ĉiujare metas kandeletojn nomitajn « Lumignons » sur la fenestro-randoj de miaj sinsekvaj loĝejoj kaj preskaŭ ĉiuj lionanoj same faras, omaĝe al Sanktulino Marie, kiu savis la urbon de la pesto kutima mezepoka plago sed ankaŭ poste kaj aparte en 1628 kiam preskaŭ la duono de la lionanoj mortis de tiu ĉi malsano. Ĝi ankaŭ plagis ilin en 1631, 1637,1639 kaj 1642.



La 8an de septembro 1643, la skabenoj ( *échevins* en la franca lingvo) promesis iri ĉiujare en procesio al la monteto Fourvière por oferti oran ŝildon kaj sep funtojn da blanka vakso se la epidemio ne atingos la urbon. Tio ĉi estas la deziro de la Konsuloj.

Ekde la mezepoko, la 8a de septembro estas ligita al la festado de la koncipiĝo de la Virgulino Maria. Tamen, la katolika dogmo de la Senmakula Koncipiĝo – laŭ kiu Maria estis konceptita sen la prapeko heredita de ĉiuj homoj ekde Adamo kaj Eva – estis proklamita nur la 8an de decembro 1854 per decido de la papo Pio la 9-a.

Krome de kiam la urbo iĝis konsulejo ? Post la romia epoko Liono estis ĉefe sub la regado de la aŭtoritato de la katolika eklezio. En 1320 la ĉefepiskopo donis al la burĝaro franĉizan ĉarton establantan la Konsulejecon. Parto de la administrado estis atribuita al 12 konsuloj elektitaj ĉiujare fare de la majstroj de la metioj.


Nu, kio pri la 8a de decembro ?

La 8an de septembro 1852 estis okazinta la inaŭguro de la ora statuo de la Virgulino Marie metita sur la sonorilturo de la malnova kapelo de Fourvière sed ĝi estis prokrastita pro veterkialoj ĝis la 8a de decembro. Denove pluvego intervenis kaj la tiama kardinalo ne povis lumigi la statuon ĉar inundo de la rivero Saono dronigis la atelierojn. Sed la loĝantoj atenditintaj tri monatojn ne volis nuligi la feston kaj ekbruligis la preparitajn kandeletojn por omaĝi la sanktulinon.

Verdire, la nuntempaj lionanoj tradicie metas siajn kandeletojn sur la fenestroj ne pro religia kredo sed ĉar tiu manifestacio iĝis liona simbolo kaj montras la fortan ligon de la loĝantoj al ilia urbo.

Kaj fine ni alvenas al la starigo de la lumfesto tutmonde konata.

En 1989 la urbestro Michel Noir decidis lumigi la emblemajn monumentojn de Liono, kaj 10 jaroj postaj sub la mandato de Raymond Barre festivalo de lumoj iĝis la unua kvartaga lumfesto, nun vizitata de milionoj da homoj.



Mi konfesas, ke tiu ĉi ne plu vere interesas min, sed ĉiujare je tiu periodo post la deĵorado en la sidejo de nia asocio, kiu situas en la duoninsulo, centro de la urbo, mi promenas por vidi la instalaĵojn preparatajn antaŭ la turisma invado !

☛ **Esperanto Festo 2025** - Marc-Olivier GRAZIANI

Nia asocio estis honorigita per la ĉeesto de niaj regionaj amikoj el Grenoble kaj Saint-Étienne! Ĉiujare ni estas pli multaj ol la pasintan jaron. Nia festo kreskas danke al la partopreno de ĉiuj.



La tago vigle komenciĝis danke al ludo de Neil, en kiu ni devis desegni bildon, kiun ni ne povis vidi. Nur unu homo povis vidi ĝin kaj devis priskribi la bildon kiel eble plej akurate. Tio estas tre amuza ludo, en kiu ni ankaŭ povas praktiki nian Esperanton.



Poste, ni manĝis kune, dividante agrablan manĝon preparitan de ĉiuj.



Post la tagmanĝo, Pierre el Saint-Étienne faris teknikan kaj interesan prelegon pri la rekonstruado de Notre-Dame de Paris.




Fine, ni ĝuis tre bonan muzikan koncerton de Gijom Armide kaj Melono. Gijom prezentis al ni sian novan muzikalbumon, kaj ankaŭ kelkajn tradukitajn kantojn de francaj artistoj. Eĉ neesperantitoj venis al tiu evento.

